

Georg Trakl,
Verklärter Herbst

Gewaltig endet so das Jahr
mit goldnem Wein und Frucht der Gärten.
Rund schweigen Wälder wunderbar
und sind des Einsamen Gefährten.

Da sagt der Landmann: Es ist gut.
Ihr Abendglocken lang und leise
gebt noch zum Ende frohen Mut.
Ein Vogelzug grüßt auf der Reise.

Es ist der Liebe milde Zeit.
Im Kahn den blauen Fluss hinunter
wie schön sich Bild an Bildchen reiht –
das geht in Ruh und Schweigen unter.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas GEORG TRAKL (*1887-02-03 – †1914-11.03).*

Arg-607-1221 (2012-10-08 22:37:38)

Siehe auch: http://de.wikipedia.org/wiki/Georg_Trakl.

Georg Trakl,
Aŭtuno transfigurita

tradukita de Manfred Retzlaff

Finiĝas pompe nun la jar'
kun ora vin' kaj frukt-riceco.
Silentas ĉie la arbar',
nin akompanas en soleco.

Nun klinas jam la suno sin.
Vi sonoriloj de vespero,
nin kuraĝigu je la fin'!
Forflugas birdoj tra l' aero.

Tre belajn bildojn vidas ni,
sur la rivero veturante.
La temp' de l' amo estas ĝi –
Ripozas ni nun silentante.

*Traduko de la Germana poemo "Verklärter Herbst" de GEORG TRAKL (*1887-02-03 – †1914-11.03) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-607-1222 (2012-10-08 22:22:50)

Esperantigis (iom libere): Manfred Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2001-10-23 laŭ la origina germanalingva teksto.